

01 KAZO DE DOKTORO MEJZLÍK

"Aŭskultu, sinjoro Dastych," diris enpense policoficisto d-ro Mejzlík al la maljuna sorĉisto, "verdire mi iras al vi por konsulti vin. Jen mi havas kazon, super kiu mi estas senkonsila."

"Eldiru ĝin do," diris sinjoro Dastych. "Kiun koncernas la kazo?"

"Min," ekĝemis d-ro Mejzlík. "Ju pli mi pripensas tion, des malpli klara ĝi estas por mi. Aŭskultu, el tio oni povus frezeziĝi."

"Do, kion iu faris al vi?" demandis kvietige sinjoro Dastych.

"Neniu," ekdiris d-ro Mejzlík. "Jen, kio min plej incitas. Mi mem faris ion, kion mi ne komprenas."

"Eble ĝi ne estos tiel malbona," konsolis lin la maljuna Dastych. "Do, kion vi faris, junulo?"

"Mi kaptis kasrompulon," respondis d-ro Mejzlík morne.

"Kaj jen ĉio?"

"Jen ĉio."

"Kaj la kasrompulo versimile ne estis la ĝusta," helpis sinjoro Dastych.

"Estis, li konfesis ja. Li elrompis kason en Juda Bonfara Societo, ĉu vi scias? Li estis iu Rozanowski aŭ Rosenbaum el Lvovo," murmuris d-ro Mejzlík. "Oni trovis ĉe li rompilojn kaj ĉion."

"Nu, kaj kion vi ŝatus scii?" instigis lin la maljuna Dastych.

"Mi ŝatus scii," diris la policoficisto mediteme, "kiel mi kaptis lin. Atendu, mi diros tion laŭvice al vi. Antaŭ unu monato, tio estis la trian de marto, mi deĵoris ĝis noktomezo. Mi ne scias, ĉu vi memoras, ke tiam jam la trian tagon pluvis. Do por kelkaj momentoj mi eniris kafejon kaj poste mi volis iri hejmen, al Vinohrady. Sed anstataŭ tio mi iris kontraŭan direkton al Dlážděná strato. Mi petas vin, ĉu vi ne scias, kial mi iris ĝuste tiun flankon?"

"Eble nur iel hazarde," opiniis sinjoro Dastych.

"Aŭskultu, en tia vetero oni ne vagas nur iel hazarde tra la stratoj. Mi ŝatus scii, kion mi tie, ĉe ĉiuj diabloj, volis.

01 PŘÍPAD DR. MEJZLÍKA

"Poslyšte, pane Dastychu," řekl zamyšleně policejní úředník dr. Mejzlík starému kouzelníkovi, "já k vám jdu vlastně na poradu. Já mám tuhle jeden případ, se kterým si nevím rady."

"Tak ven s tím," děl pan Dastych. "Kohopak se ten případ týká?"

"Mne," vzdychl dr. Mejzlík. "Čím víc na to myslím, tím míň do toho vidím. Poslouchejte, člověk by se z toho zbláznil."

"Tak co vám kdo udělal?" ptal se chláholivě pan Dastych.

"Nikdo," vyhrkl dr. Mejzlík. "To je to nejhorší. Já sám jsem něco udělal, čemu nerozumím."

"Snad to nebude tak zlé," těšil ho starý Dastych. "Tak co jste to provedl, mládenče?"

"Chytil jsem kasaře," odpověděl dr. Mejzlík pochmurně.

"A to je všechno?"

"To je všechno."

"A ten kasař asi nebyl ten pravý," pomáhal pan Dastych.

"Ale byl, vždyť se přiznal. Udělal kasu v Židovském dobročinném spolku, víte? Byl to nějaký Rozanowski čili Rosenbaum ze Lvova," bručel dr. Mejzlík. "Našli u něho hasáky a všechno."

"No, a co byste rád věděl?" pobádal ho starý Dastych.

"Já bych rád věděl," řekl policejní úředník zahloubaně, "jak jsem ho chytil. Počkejte, já vám to povím po pořádku. Před měsícem, to bylo třetího března, jsem měl až do půlnoci službu. Já nevím, jestli se pamatujete, že tehdy už třetí den pršelo. Tak jsem si zaskočil na chvílku do kavárny a pak chci jít domů, na Vinohrady. Ale místo toho jsem šel opačným směrem k Dlážděné ulici. Prosím vás, nevíte, proč jsem šel zrovna v tu stranu?"

"Snad jen tak, náhodou," mýnil pan Dastych.

"Poslouchejte, v takovém počasí necourá člověk jen tak náhodou po ulicích. Já bych rád věděl, co jsem tam u všech sakramentů chtěl.

Kion vi opinias, ĉu tio povus esti ia antaŭsento? Sciu, io kiel telepatio."

"Aha," diris sinjoro Dastych. "Ĝi estas tute ebla."

"Do vidu," parolis d-ro Mejlík zorgoplene. "Jen ĝi estas. Sed ankaŭ ĝi povis esti ia subkonscia imago, ke mi iru rigardi, kio estas ĉe la Tri Virgulinoj."

"Jes, tiu hotelaĉo en strato Dlážděná," rememoris sinjoro Dastych.

"Ĝuste tiu. Tie tranoktadas la kasropuloj kaj poŝtoŝtelistoj el Budapeŝto aŭ Galicio venintaj labori en Pragon. Tiun lokalon ni atentis. Kion vi opinias, ĉu tio estis tute ordinara polica kutimo, ke mi iris tien por enrigardi?"

"Povas esti," konkludis sinjoro Dastych. "Tiajn aferojn iam oni faras tute mekanike, ĉefe se oni havas devo-senton. Nenio eksterordinara ĉe tio."

"Do mi iras al la strato Dlážděná," daŭrigis d-ro Mejlík, „rigardas preterpase nomaron de tranoktatoj ĉe la Tri Virgulinoj kaj pluiras. Je fino de la strato Dlážděná mi haltas kaj celas denove returne; mi petas ĝentile, ĉu vi scias, kial mi retroiris?"

"Kutimo," opiniis sinjoro Dastych. "Kutimo patroladi."

"Tio povus esti," konsentis la policoficisto. "Sed mi ne deĵoris kaj volis iri hejmen. Eble ĝi estis antaŭsento."

"Tiaj kazoj estas," rekonis sinjoro Dastych. "Sed tia antaŭsento estas nenio mistera. Estas ja konate, ke en la homo ekzistas iaj superaj kapabloj. . ."

"Diable," ekkriegis d-ro Mejlík, "estis tio do kutimo aŭ iuj superaj kapabloj? Tion mi ŝatus scii! - Do atendu: Dum mi tiel plandas, iras kontraŭ min iu homo. Diru, kial, tondro al tio, ne povus kiu ajn iri je la unua nokte tra Dlážděná strato? Je tio nenio estas suspektinda. Mi mem tute nenion konjektis; sed mi haltis ĝuste sub lanterno kaj estis bruliganta la egiptan. Sciu, tion ni faras, volante nokte iun funde pririgardi. Kion vi opinias: ĉu ĝi estis hazardo aŭ kutimo, aŭ. . . aŭ ia subkonscia alarmo?"

Co myslíte, nemohlo to být nějaké tušení? Víte, něco jako telepatie."

"Aha," pravil pan Dastych. "To je docela možné."

"Tak vidíte," mluvil dr. Mejlík ustaraně. "Tady to máme. Ale taky to mohla být taková podvědomá představa, abych se podíval, co je u Tří panen."

"To je ten zapadák v Dlážděné ulici," vzpomněl si pan Dastych.

"Právě. Tam přespávají tihle kasaři a kapsaři z Pešti nebo z Haliče, když přijdou do Prahy na práci. My na ten lokál dáváme pozor. Co myslíte, nebyl to docela obyčejný policejní zvyk, že jsem se tam šel mrknout?"

"To může být," soudil pan Dastych. "Takové věci dělá někdy člověk docela mechanicky, hlavně když jaksí má smysl pro povinnost. Na tom není nic zvláštního."

"Tak já jdu do Dlážděné ulice," pokračoval dr. Mejlík, "podívám se mimochodem na seznam noclehářů u Tří panen a jdu dál. Na konci Dlážděné ulice se zastavím a mířím zase zpátky; pěkně prosím, nevíte, proč jsem šel zpátky?"

"Zvyk," mínil pan Dastych. "Zvyk patrolovat."

"To by mohlo být," souhlasil policejní úředník. "Ale já jsem neměl službu a chtěl jsem jít domů. Třeba to byla předtucha."

"Bývají takové případy," uznával pan Dastych. "Ale taková předtucha není nic záhadného. To je přece známo, že v člověku jsou jakési vyšší schopnosti..."

"Hergot," zařval dr. Mejlík, "tak byl to zvyk, nebo nějaké vyšší schopnosti? Tohle bych rád věděl! - Tak počkejte: Když si to tak šlapu, jde proti mně nějaký člověk. Řekněte, pročpak by u všech všudy nemohl kdokoliv jít v jednu hodinu v noci Dlážděnou ulicí? Na tom není nic podezřelého. Já sám jsem na nic ani nepomyslel; ale zastavil jsem se zrovna pod lucernou a zapaloval jsem si egyptku. Víte, to my děláme, když se chceme v noci na někoho pořádně podívat. Co myslíte: byla to náhoda, nebo zvyk, nebo... nebo nějaký podvědomý alarm?"

"Tion mi ne scias," diris sinjoro Dastych.

"Ankaŭ mi ne," kolere ekkriis d-ro Mejlík. "Tondro al tio! Do mi bruligas la cigaredon sub la lanterno kaj tiu homo iras preter mi. Sinjoro, eĉ ne lian nazon mi rigardis kaj nur gapas teren. Kiam tiu ulo estis preteririnta, io ekmalplaĉis al mi. Diablo, mi diris al mi, jen io ne estas en ordo - sed kio fakte? ja apenaŭ mi atentis tiun moŝtulon. Mi staras do en pluvo sub la lanterno kaj pripensas; kaj subite ideo: ŝuoj! Tiu homo havis ion strangan sur la ŝuoj. Kaj subite ial mi diras laŭte: cindro."

"Kia cindro?" demandis sinjoro Dastych.

"Nu, cindro. Tiumomente mi rememoris, ke la homo havis sur la ŝuoj inter supraĵo kaj plandumo cindron."

"Kaj kial li ne havu cindron sur la ŝuoj?" opiniis sinjoro Dastych.

"Memkompreneble," ekvokis d-ro Mejlík. "Sed, sinjoro, en tiu momento mi vidis, jes, vidis la eltranĉitan fajrorezistan kason, el kiu ŝutiĝas cindro sur plankon. Sciu, cindro kiu estas inter ŝtalplatoj. Kaj mi vidis, kiel la ŝuoj plandas en cindro."

"Do ĝi estis intuicio," decidis sinjoro Dastych. "Genia, sed hazarda intuicio."

"Absurdaĵo," diris d-ro Mejlík. "Homo, se ne pluvus, do nepre mi ne rimarkus la cindron. Sed kiam pluvus, oni ordinare ne havas cindron sur ŝuoj, komprenite?"

"Do ĝi estis empiria konkludo," diris kun certeco sinjoro Dastych. "Ĝi estis brila konkludo surbaze de sperto. Kaj kio plu estis?"

"Nu, poste mi sekvis tiun ulon: memkomprene li enfalis al la Tri Virgulinaj. Poste mi telefonis por du kaŝpolicistoj kaj ni faris tie razion; ni trovis sinjoron Rosenbaum eĉ kun la cindro kaj rompiloj kaj dek du mil kronoj el la kaso de Juda Bonfara Societo. Jam nenio menciinda. Vi scias, ke en ĵurnaloj oni skribis, ke ĉi-foje nia polico montris konsiderindan pretecon - kia absurdo!

"To nevím," ŝekl pan Dastych.

"Já taky ne," křikl zlostně dr. Mejlík. "Hrom do toho! Tedy si zapaluju cigaretu pod tou lucernou a ten člověk jde podle mne. Pane, já jsem se mu ani nepodíval na nos a jenom tak čumím k zemi. Když ten chlap přešel, začalo se mně něco nelíbit. Čerchmante, řekl jsem si, tady není něco v pořádku – ale co vlastně? Vždyť jsem si toho vašnosti ani nevšiml. Tak stojím v dešti pod tou lucernou a přemýšlím; a najednou mě napadlo: boty! Ten člověk měl něco divného na botách. A já vám z ničeho nic povídám nahlas: popel."

"Jaký popel?" ptal se pan Dastych.

"No popel. V tu chvíli jsem si vzpomněl, že ten člověk měl na botách mezi svrškem a podrážkou popel."

"A proč by neměl mít na botách popel?" mýnil pan Dastych.

"To se rozumí," zvolal dr. Mejlík. "Ale pane, v ten okamžik jsem viděl, ano, viděl vyříznutou ohnivzdornou kasu, ze které se sype popel na podlahu. Víte, ten popel, co je mezi ocelovými pláty. A já jsem viděl, jak ty boty šlapou do toho popela."

"Tak to byla intuice," rozhodl pan Dastych. "Geniální, ale nahodilá intuice."

"Nesmysl," řekl dr. Mejlík. "Člověče, kdyby nepršelo, tak bych si toho popela ani nevšiml. Ale když prší, tak lidé obyčejně nemají na botách popel, rozumíte?"

"Tak to byl empirický závěr," pravil s jistotou pan Dastych. "Byl to skvělý úsudek na základě zkušenosti. A co bylo dál?"

"Inu, pak jsem šel za tím chlapem: to se ví, zapadl ke Třem pannám. Potom jsem zatelefonoval pro dva tajné a udělali jsme tam štáru; našli jsme pana Rosenbauma i s tím popelem a hasáky a dvanácti tisíce z kasy Židovského dobročinného spolku. Na tom už nic není. To víte, v novinách se psalo, že tentokrát naše policie ukázala značnou pohotovost - takový nesmysl!

Mi petas vin, se hazarde mi ne estus irinta tra la strato Dlážděná kaj hazarde ne rigardus ŝuojn de tiu kanajlo. . . Nome," diris d-ro Mejlík deprimite, "se ĝi estus nur hazardo. Jen ĝuste tio."

"Tio ne gravas ja," opiniis sinjoro Dastyh. "Juna homo, tio estis sukceso, pro kiu vi povas gratuli al vi."

"Gratuli," eksplodis d-ro Mejlík. "Sinjoro, kial mi gratulu al mi, se mi ne scias por kio? Al mia fabela detektiva akrevido? Aŭ al la mekanikaj policaj kutimoj? Aŭ al la feliĉa hazardo? Aŭ al ia intuicio kaj telepatio? Rigardu, tio estis mia unua pli granda kazo; ion oni devas sekvi, ĉu? Ni supozu tion, morgaŭ oni donos al mi iun murdon; sinjoro Dastyh, kion mi faros? Ĉu kuri tra stratoj kaj rigardi akrevide ŝuojn de homoj? Aŭ mi iru post la nazo kaj atendu, ĝis ia antaŭsento aŭ interna voĉo kondukos min direkte al murdinto? Vidu do, jen la kazo. La polico nun diras: Tiu Mejlík, tiu havas flaron; el tiu okulvitra junulo io estos, li estas detektiva talento. Ja ĝi estas senespera situacio," murmuris d-ro Mejlík.

"Ian metodon oni devas havi. Ĝis mia unua kazo mi kredis je diversaj ekzaktaj metodoj, sciu, je observado, sperto, sistema esploro kaj tiaj malsaĝaĵoj. Kaj kiam nun mi analizas la kazon, do mi vidas, ke – Aŭskultu," li ekdiris kun senpeziĝo, "mi opinias, ke ĝi estis nur feliĉa hazardo."

"Ĝi aspektas tiel," diris sinjoro Dastyh saĝe. "Sed ankaŭ enestis iom da bona observado kaj logiko."

"Kaj la mekanika rutino," diris la juna oficisto senkuraĝe.

"Kaj intuicio. Kaj ankaŭ iom da donaco de antaŭsento. Kaj instinkto."

"Jesuo Kristo, jen vi vidas," veis d-ro Mejlík. "Sinjoro Dastyh, kiel nun mi faru ion?"

"Sinjoro doktoro Mejlík al telefono," anoncis ĉef-kelnero. "Vokas polica prezidio."

"Jen ĝi estas," ekmurmuris d-ro Mejlík konsternite; kaj kiam li revenis de telefono, li estis pala kaj nervoza.

Prosím vás, kdybych náhodou nebyl šel do té Dlážděné ulice a náhodou se nepodíval tomu gaunerovi na boty... Totiž," děl dr. Mejlík sklíčeně, "byla-li to jen tak náhoda. To je právě to."

"Na tom přece nezáleží," mínil pan Dastyh. "Mladý člověče, to byl úspěch, ke kterému si můžete gratulovat."

"Gratulovat!" vybuchl dr. Mejlík. "Pane, jakpak si mám gratulovat, když nevím k čemu? K svému báječnému detektivnímu bystrozraku? Nebo k mechanickým policejním zvykům? Nebo k šťastné náhodě? Nebo k nějaké intuici a telepatii? Koukněte se, to byl můj první větší případ; něčeho se člověk musí držet, že? Dejme tomu, zítra mně dají nějaký mord; pane Dastychu, co budu dělat? Mám běhat po ulicích a koukat lidem bystrozrace na boty? Nebo mám jít za nosem a čekat, že mě nějaká předtucha nebo vnitřní hlas povede rovnou k vrahovi? Tak vidíte, to je ten případ. Celá policie si teď říká: Tenhle Mejlík, ten má nos; z toho mládence s brejlemi něco bude, to je detektivní talent. Vždyť je to zoufalá situace," bručel dr. Mejlík. "Nějakou metodu člověk musí mít. Do svého prvního případu jsem věřil na všelijaké ty exaktní metody; víte, na pozorování, na zkušenost, na soustavné vyšetření a takové hlouposti. Ale když si teď probírám ten případ, tak vidím, že – Poslouchejte," vyhrkl s úlevou, "já myslím, že to byla jen šťastná náhoda."

"Vypadá to tak," řekl pan Dastyh moudře. "Ale byl v tom také kus dobrého pozorování a takové té logiky."

"A mechanická rutina," děl mladý úředník malomyslně.

"A intuice. A taky trochu takový dar předtuchy. A instinkt."

"Ježíšikriste, tak to vidíte," bědoval dr. Mejlík. "Pane Dastychu, jak mám nyčko něco dělat?"

"Pan doktor Mejlík k telefonu," hlásil pan vrchní. "Volá policejní prezidium."

"Tady to máme," zahučel dr. Mejlík zdrceně; a když se vrátil od telefonu, byl bledý a nervózní.

“Platit, pane vrchní,” křikl podrážděně. “Už to tak je. Našli nějakého cizince zavražděného v hotelu. Hrom aby –” a odešel. Zdálo se, že tento energický mladý muž má trému.

"Mi pagas, sinjoro ĉefkelnero," li ekkriis incitite. "Estas jam tiel. Oni trovis iun fremdulon murdita en hotelo. Tondro al -" kaj li foriris. Ŝajnis, ke ĉi tiu energia juna homo havas tremon.